

UNUA INTERNACIA KONFERENCO PRI LA LINGVA PROBLEMO EN LA SCIENCO

La lingva problemo en la scienco fariĝis premega en la nuntempo, ĉar ĝi konstante forrabas la tempon kaj la energion de sciencistoj, malfaciligas la kontaktojn inter ili, lasas oftege neatentitaj sciencajn atingaĵojn el neprivilegiitaj lingvoregionoj, malaltigas la fruktojn de diversaj internaciaj sciencaj konferencoj kaj kongresoj ktp., ktp. Konsiderinte ĉion tion, la Estraro de **Internacia Scienca Asocio Esperantista** interkonsentis organizi, en kunlaboro kun **Universala Esperanto Asocio**, specialan konferencon, kiu pritraktos la lingvajn problemojn koncernantaj diversajn branĉojn de scienco, okazonta dum la 47-a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago (4-a ĝis 11-a de aŭgusto 1962.).

La prezidanto de la Organiza Komitato de la Konferenco, D-ro P. Neergaard, faris la alvokon al sciencistoj (per la cirkulero de la 13-a de febr. 1962) kontribui al la laboroj de la Konferenco. Bedaŭrnde la tempo por la preparoj estis tre mallonga kaj membroj de la Asocio ne kontaktis sufiĉan nombron da sciencistoj ekster esperantistaj rondoj por ke ankaŭ ili partoprenu la laborojn. Iom pli modelaj estis nur la preparoj en Aŭstrio kaj en Sovetunio. En Aŭstrio oni kontaktis skribe kun granda nombro da sciencistoj kaj en Sovetunio estis organizita la landa preparkomitato kiu per nacilingva cirkulero kontaktis la sciencistojn (speciala rezulto de tia ago estas prikonsidero de la lingva problemo en la Konsilantaro de la Geografia Instituto de la Scienca Akademio, kies rezolucion oni povas legi en la IV-a parto de ĉi tie prezentita materialo). Oni devas substreki ke la sukceso de la Konferenco estus multe pli granda se la preparoj en diversaj landoj estus pli vastaj.

Laŭ la proponita (poste ankaŭ efektivigita) plano, la Konferenco havis trispecan laboron: 1) la prelegoj en la dumkongresa **Internacia Somera Universitato** pri diversaj ampleksaj temoj de la Konferenco; 2) pli mallongaj skribaj kontribuaĵoj pri specialaj nelarĝaj problemoj; 3) pridiskuto de la tuta materialo dum unutagaj plenkunsidoj. Por la prelegoj en I. S. U. estis efektivigitaj 6 temoj, krom kiuj alvenis pluraj aliaj kontribuaĵoj, el kiuj 20 eniris en la **Temaro por diskutado** (53+5 aldonaj paĝoj, multobligitaj, kun presita kovrilo, kune kun la Enkonduko kaj kun la listo de la antaŭe anoncitaj partoprenantoj). La

Temaron oni disdonis antaŭ la Konferenco al la partoprenantoj, kiuj tiel povis prepari sin por la diskutado.

La Konferencon partoprenis 44 sciencistoj kaj 16 observantoj el 17 landoj. La prelegoj en I. S. U. okazis de la 5-a ĝis la 8-a de aŭgusto kaj la 9-a de aŭgusto estis dediĉita al la diskutado. La materialo por la diskutado estis en la Temaro dividita en 10 sekcioj kaj la evoluon de la diskutado oni povas vidi en ĉi tie publikigita Raporto. Ankaŭ ĉi tie estas la materialo ordigita laŭ la samaj sekcioj, kun jenaj ŝanĝoj: 1) la materialo de la III-a sekcio aperos poste detale en Scienca Revuo; la materialo de la IV-a sekcio estas ankoraŭ diskutenda, pro kio ni ĝin ne publikigas ĉi tie; 3) la sekcio pri ekzaktaj sciencoj prenis ĉi tie pli naturan lokon tuj post geografio kaj 4) la materialo el medicino, ĉar neampleksa, estas kunigita ĉi tie kun materialo de la biologia scienco.

Ni esperas ke ĉi tiu Unua Konferenco ne estos la lasta. Oni devas, surbaze de ĉi tiuj pritraktoj de la problemo, organizi novajn konferencojn, kiuj pritraktus apartajn aspektojn de la problemo. Sed por la estontaj konferencoj oni devas nepre fari pli larĝajn preparojn, kun partopreno de larĝaj sciencaj rondoj en ĉiuj landoj. Nur se tiel ni faros, la utilo por antaŭenigo de scienca laboro estos sufiĉe granda.

Prof. D-ro B. Popović

06.053.7 : 659.25

RAPORTO PRI LA UNUA INTERNACIA KONFERENCO PRI LA LINGVA PROBLEMO EN LA SCIENCO,

okazinta de la 5-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1962 en la Kongresejo
de la 47-a Universala Kongreso de Esperanto, la Teknika
Altlernejo, Kopenhago.

La konferenco okazis per prezentado de prelegoj en la kadro de la Internacia Somera Universitato, la 5-an — 8-an de aŭgusto, kaj per diskutaj kunsidoj en salono Unesco de la Kongresejo, la 9-an de aŭgusto 1962.

La laborkunsidon malfermis la komisiito por organizado de la Konferenco, **D-ro Paul Neergaard**, Kopenhago, je la horo 9.45. Li salutis la membrojn kaj observantojn de la Konferenco (kune ĉ. 60 personoj):

En la nomo de la invitintaj organizaĵoj, Universala Esepranto-Asocio kaj Internacia Scienca Asocio Esperantista, mi havas la honoron kore bonvenigi vin al tiu ĉi la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Scienco. Ĉiuj membroj de la Konferenco jam ricevis la Temaron por Diskutado de la Konferenco, enhavantan en pli malpli resumita formo la enkondukojn intencitajn por pritraktado dum tiu ĉi kunsido Kiel oni vidas el tiu ĉi kajero, la materialo pritraktota de la Konferenco estas sufiĉe ampleksa, dum aliflanke la tempo disponebla por la diskutoj estas tre malabunda. Vere, la sukceso de la Konferenco esence dependas de tio, ĉu ni sukcesos eviti perdiĝon en longedaŭraj enkondukaj paroladoj, kiuj lasus nesufiĉe da tempo al la diskutoj mem kaj al pritrakto de konkludoj. Nu, mi esperas, ke spite al la okupiteco de la konferencanoj dum la Kongreso vi trovis tempon por tralegi almenaŭ tiujn enkondukojn, kiuj rilatas al via fako aŭ al viaj specialaj intereso. Tial mi proponas, ke la enkondukoj, kies tekstojn vi jam havas, ne estu ĉi tie prelegitaj, sed ke la enkondukantoj per nemultaj vortoj, ni diru per 2-minuta enkonduketo, klarigu la gravajn punktojn de sia teksto prezentante eventualajn proponojn se dezirinde. Tiel procedante ni ŝparos tempon por la ĉefa celo de la Konferenco: interŝanĝado de informoj kaj vidpunktoj. Kion ni povas esperi atingi el tiu ĉi Konferenco ne estas iaj konkretaj rezultoj, sed pli verŝajne atentigo al problemoj, kiujn poste devas pristudi laborgrupoj